

Ekumena Kolekto

La Sankta Evangelio de Jesuo



La parabolo de la perdita ŝafo

**Soldatetoj
de
Dio
LBV**



William Luz

La parabolo de la perdita ŝafo

(Rakonto inspirita de la Sankta Evangelio de Jesuo laŭ Mateo, 18:12 ĝis 14; kaj Luko, 15:1 ĝis 7.)



San-Paŭlo/SP — Brazilo — 2022
Eldonejo Elevação

www.ReligiodeDio.org





ENHAVTABELO



TRAKTAĴO PRI LA NOVA
ORDONO DE JESUO

3

RAKONTO

7

KOMENTO

20

LA DEK MONEROJ

22

AMIKOJ (PAIVA NETTO)

27

KAJERO DE EKZERCOJ

28

JESUO, LA EKUMENA KRISTO,
LA DIA ŜTATESTRO

50

VORTARETO DE LA
RAKONTO

54

KATALOGA KARTO

55



Ni legu ĉi tiujn valorajn instruojn de Jesuo kun niaj gepatroj:



Traktaĵo pri la Nova Ordono de Jesuo,

aranĝita de Paiva Netto, akorde kun la Evangelio de la Kristo de Dio laŭ **Johano**, 13:34 kaj 35; kaj 15:7, 8, 10 ĝis 17 kaj 9.

Instruis Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro★:

“13:34 Novan Ordonon Mi donas al vi: vi amu unu alian, kiel Mi vin amis.



IRU AL LA
SEKVA PAĜO

13:35 Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia.

15:7 Se vi restadas en mi, kaj miaj vortoj restadas en vi, petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi. *15:8 En tio mia Patro estas glorata, ke vi donas multe da frukto; kaj vi estos miaj disĉiploj.*

15:10 Se vi observos miajn ordonojn, vi restados en mia Amo tiel same, kiel Mi observis la ordonojn de mia Patro kaj restadas en Lia Amo.

15:11 Tion Mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena.



*15:12 Jen estas mia Ordono:
ke vi amu unu
alian tiel same,
kiel Mi vin
amas. 15:13 Neniu
havas Amon pli grandan ol
tio, ke iu demetus sian vivon
por siaj amikoj.*



*15:14 Vi estas miaj amikoj, se vi
faras tion, kion Mi al vi ordonas.*

*15:17 Kaj Mi tion ordonas: vi amu
unu alian, kiel Mi vin amis.*

*15:15 Mi jam ne nomas vin sklavoj,
ĉar la sklavo ne scias, kion lia
sinjoro faras; sed Mi nomis vin
amikoj, ĉar ĉion, kion Mi lernis de
mia Patro, Mi sciigis al vi.*



IRU AL LA
SEKVA PAĜO



15:16 Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu bonan frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo.

15:17 Tion Mi ordonas al vi: ke vi amu unu la alian, kiel Mi amas vin. ^{15:9} Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu en mia Amo”.



★ Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro —
Legu pli pri tiu temo en la paĝo 50.

La parabolo de la perdita ŝafo

(Rakonto inspirita de la Sankta Evangelio de Jesuo laŭ Mateo, 18:12 ĝis 14; kaj Luko, 15:1 ĝis 7.)







UNU FOJON OKAZIS, KE
HOMMASO AŬDIS LA INSTRUOJN
DE JESUO, KIAM GRUPO DA HOMOJ
KUN MALMOLA KORO, ĜENITAJ PRO
LA FAKTO, KE TIE TROVIĜAS MULTAJ
HOMOJ, KOMENCIS PAROLI:

— ***JESUO BABILAS KUN PEKULOJ
KAJ EĈ MANGĜAS KUN ILI.***





RIMARKINTE TION, KIO OKAZIS, LA
DIA MAJSTRO RAKONTIS AL ĈIUJ LA
PARABOLON DE LA PERDITA ŜAFO,
POR KLARIGI, KE DIO EGALE AMAS
ĈIUJN ESTULOJN SUR LA TERO, KAJ
NEK FORLASAS, NEK FLANKENLASAS
IUN AJN, NENIAM:



**KIU INTER VI, POSEDANTE
CENT ŜAFOJN KAJ
PERDINTE NUR UNU EL
ILI, NE LASUS EN SEKURA
LOKO LA NAŬDEK
NAŬ SUR LA STEPO
KAJ IRUS SERĈI TIUN,
KIU ERARVAGIS, ĜIS VI
TROVOS ĜIN?**





**NAŬDEK SEP, NAŬDEK
OK, NAŬDEK NAŬ... HE! ÇU
MANKAS UNU ŜAFETO?**





***MI JEN LASOS ĈIUJN ĈI TIE,
PROTEKTITAJ, KAJ MI IROS POR
SERĈI TIUN, KIU PERDIĜIS...***

... BALDAŪ MI REVENOS.





MIA SÁFETO!



MEEEEEEEEEE!
(DANKEGON!)



**KIAM VI ĜIN
TROVAS,
VI METAS
LA ŜAFON
SUR VIAJN
ŜULTROJN,
PLENA DE
ĜOJO.**





**KAJ REVENINTE HEJMEN,
VI KUNVENIGOS
VIAJN GEAMIKOJN
KAJ NAJBAROJN KAJ
DIROS: ĜOJU KUN MI,
ĈAR MI TROVIS MIAN
ERARVAGINTAN ŜAFON.**





FINE DE LA PARABOLO, JESUO
KLARIGIS:

**— TROVIĜOS PLI DA ĜOJO
EN LA ĈIELO PRO PEKULO, KIU
PENTAS, OL PRO NAŬDEK NAŬ
JUSTULOJ, KIUJ NE BEZONAS
PENTI.**





KOMENTO

WILLIAM LUZ

KARAJ SOLDATETOJ
DE DIO, JESUO ESTAS
LA DIA PAŜTISTO,
KIU TAGNOKTE
LABORADAS POR
KONDUKI ĈIUJN AL
LA VOJO DE BONO,
NE EKSKLUDANTE
IUN AJN. TIEL NI



FRATO PAIVA

DEVAS AGADI DUM NIA VIVO. SUB LA
INSPIRO DE JESUO, FRATO PAIVA
INSTRUIS AL NI, KE **“ONI DEVAS
NE REZIGNI PRI HOMOJ,
KIUJN ONI AMAS; EĈ SE,
PRO IA KIALO, ONI NE
PLU AMAS LIN AŬ ONI**

IRU AL LA
SEKVA PAĜO



***NENIAM AMIS LIN. EFEKTIVE,
ONI NENIEL RAJTAS RIFUZI
APOGON AL HOMO, ĈAR
EN PROFUNDA SENCO NI
FORMAS GRANDEGAN
FAMILION DE DIO. NI
LERNU KUN JESUO —, KIU
ESTAS LA GRANDA AMIKO,
KIU NE FORLASAS AMIKON
MEZE DE LA VOJO —, KE
LA ZORGEMA PAŜTISTO
SERĈAS PERDITAN ŜAFON IE
AJN, KIE ĜI TROVIĜAS.***



LA DEK MONEROJ

BILDSTRIA RAKONTO SUB INSPIRO DE LA PARABOLO PRI DEK MONEROJ, KIUN JESUO INSTRUIS EN SIA EVANGELIO LAŬ LUKO, 15:8 ĜIS 10, POST KIAM LI PREZENTIS LA PARABOLON DE LA PERDITA ŜAFO.



FINE, POST LONGA LABORO, MI SUKCESIS KUNIGI TIUJN MONEROJN, NUN MI HAVAS DEK DRAKMOJN.




MI ĈI TIE KAŜOS ILIN.



NE RIMARKINTE TION, ŜI PERDAS UNU EL LA MONEROJ.







POST IOM DA
TEMPO...



HE! ÇU
MANKAS
UNU
MONERETO?



ȘI SERCĂS...



ȘI PLU
SERCĂDAS...



JEN VI ESTAS
CÎ TIE!





VIDU... MI TROVIS
MIAN PERDITAN
DRAKMON!



JESUO FINIS TIUN PARABOLON

DIRANTE:

TIEL ANKAŬ MI DIRAS AL VI, KE SAME
[KIEL TIU VIRINO FARIĜIS TRE FELIĈA,
KE ŜI TROVIS LA MONERON], ***TROVIĜAS***
ĜOJO INTER LA ANĜELOJ DE DIO,
KIAM UNU PEKULO EKPENTAS [, ĈAR NI
ĈIUJ REPRESENTAS VERAN TREZORON
ANTAŬ DIO].



Amikoj

Paiva Netto

Neniu homo vivas en soleco!
En Feliĉo aŭ en doloro,
Tiu havas por si la Kreanton
Ardanta en la koro...

En plaĝo aŭ en dezerto,
Sur ebenaĵo au sur altebenaĵo,
Respektoplenaj, rigardante alten,
Ni vidas Jesuon tre proksima.

Geamikoj, miliardoj da astroj
Ĉiam postsekvas niajn spurojn,
Super Bono kaj malbono:

Foraj Homaroj,
Favore pensas pri ni, vibrantaj,
En universala brakumo!



Kajero de ekzercoj

**KONDUKU LA VIRINON AL
LA PERDITA DRAKMO**



A wooden signpost with three signs. The top sign is a horizontal plank with the word 'Respondo' written in a bold, dark brown font. The middle sign is a white rectangular piece of paper pinned to a wooden plank, with the number '3' in the center. The bottom sign is a horizontal plank pointing to the right with the words 'Sekva ekzerco' written in a bold, dark brown font. The signpost is decorated with green leaves and blue flowers.

Respondo

3

Sekva ekzerco

**KIOM DA NUBOJ
TROVIĜAS ĈI-SUBE?**






A wooden signpost with three horizontal planks. The top plank is a simple rectangular board with the word 'Respondo' written on it. The middle plank is a similar board with a white sheet of paper pinned to it, featuring the number '8'. The bottom plank is an arrow-shaped board pointing to the right with the text 'Sekva ekzerco'. The signpost is decorated with green leaves and small blue flowers. The background is white.

Respondo

8

Sekva ekzerco

TROVU LA OMBRON






Respondo

1-B; 2-A; 3-C;
4-A; 5-Ĉ.

Sekva ekzerco

TROVU LA BILDON, KIU
ESTAS MALSAMA OL TIU,
KIU ESTAS ELSTARIGITA




A wooden signpost with three horizontal planks. The top plank is a simple rectangular board with the word 'Respondo' written on it. The middle plank is a similar board with a white sheet of paper pinned to it, containing the letter 'A'. The bottom plank is an arrow-shaped board pointing to the right with the text 'Sekva ekzerco'. The signpost is decorated with green leaves and small blue flowers. The background is white.

Respondo


A

Sekva ekzerco

**HELPU LA PAȘTISTON
ALVENI ĜIS LA ŜAFETO**



Respondo



Sekva ekzerco



TROVU 6 ERAROJN




Respondo



Sekva ekzerco

**HELPU LA PAŜTISTON
KAJ LIAJN ŜAFOJN
ALVENI EN LA HEJMON**





Respondo



Sekva ekzerco

TROVU LA BILDON
EGALAN AL TIU, KIU
ESTAS ELSTARIGITA



A wooden signpost with three signs. The top sign is a horizontal plank with the word 'Respondo' written in a bold, dark brown font. The middle sign is a vertical plank with a white paper pinned to it, featuring a large black letter 'Ĉ'. The bottom sign is a horizontal arrow-shaped plank pointing to the right with the text 'Sekva ekzerco'. The signpost is decorated with green leaves and small blue flowers. The background is white.

Respondo

Ĉ

Sekva ekzerco



TROVU 4 ERAROJN



Respondo



Sekva ekzerco

**ĈU NI TROVU ĈIUN
PERSONON, KIU
ESTAS ELSTARIGITA?**




Respondo



Sekva ekzerco


TROVU LA VOJON KUN LA PLEJ ETA SUMO







Respondo



**BLUA VOJO
(10)**



Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro

Al gepatroj, respondeculoj kaj edukistoj, ni prezentas ĉi tiun koncepton kreitan de la Prezidanto-Predikanto de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito, José de Paiva Netto, okaze de historia intervjuo, kiun li donis en la jaro 1989, al la produktanto de dokumentaj filmoj por la pola televido, tiutempe Vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, ĵurnalisto Roman Dobrzyński. Tiukaze, Roman analizis la mision



de la Templo de Bona Volo (TBV),
la Templon de la Dia Ekumenismo,
kiun Paiva Netto estis inaŭguronta
je la 21-a de Oktobro tiujara, en
la urbo Braziljo/DF, en Brazilo,
kaj demandis la estron de la
Religio de la Universala Amo pri
tio, kiel li povas prediki Senliman
Ekumenismon, parolante pri Jesuo.
Tiam, Paiva Netto parolis pri tiu
temo, kaj resumis jardekojn de sia
predikado pri tiu fundamenta temo
en la doktrino de la Religio de la
Tria Jarmilo: *“Unu el la grandaj taskoj
de la Religio de Dio, de la Kristo kaj
de la Sankta Spirito, kara Roman,
estas malsektigi Lin, ĉar Jesuo estas
la Ekumena Kristo, do universala. (...)
La Dia Majstro **ne estas limigita**. Li
estas la Ĉiela Idealo de Homeco, Amo,*



*Solidareco, Justeco kaj Kompatemo al ĉiuj estuloj spiritaj kaj homaj. **Jesuo estas ĉiutaga konkerado por tiuj, kiuj soifas pri Scio, Mizerikordo, Frateco, Grandanimeco, Libereco kaj Egaleco, laŭ la Universala Leĝo de Reenkarniĝo. Jesuo, en Si mem, ne konsistigas faktorojn de rankoro kaj militoj.** Li predikis, en Sia Nova Ordon — ‘Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj’ (Evangelio laŭ Johano, 13:34 kaj 35) —, Amon je senlima potenco. Tio, kion la surteraj estuloj faris al Lia Mesaĝo, estis krei reduktan version de ĝi (...). Riveli la altan signifon de Lia Evangelio kaj de Lia Apokalipso, sen malamema maltoleremo, tio estas, laŭ Spirito kaj*



Vero, sub la lumo de Lia Nova Ordono de Frata Amo, jen estas la elstara servo, kiun la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito faras al la monda socio (...)” Indas substreki, ke Roman fariĝis admiranto kaj diskoniganto de tiu Idealo de Bona Volo, kaj li konstante sendis al la Religio de la Universala Amo historiojn kaj spertojn travivitajn okaze de liaj prelegoj kaj instruoj en diversaj lokoj tra la mondo, interalie tiuj, kiujn li prezentis en la Universitato de Pekino, en Ĉinujo.





Vortareto de la rakonto



Dia Ŝtatestro: Esprimo kreita de Paiva Netto, kiu montras, ke Jesuo estas la Dia Reganto de niaj vivoj kaj de la planedo Tero.

Dia: Veninta de Dio; rilata al Dio, Nia Patro.



Drakmo: Greka, arĝenta monero, tre uzata en antikva tempo.

Ekumena: Universala; rilata al la tuta Universo kaj al ĉiuj estuloj.

Erarvaginta: Irinta sencele, perdiĝinta.

Estulo: lo vivanta, ekzistanta. La samo kiel homoj.

Evangelio: Bona Mesaĝo, Bona Novaĵo.

Forlasi: Ne plu prizorgi, ne plu subteni.

Parabolo: Nelonga rakonto, kiu transdonas altmoralan mesaĝon aŭ instruon.

Zorgema: Kiu traktas ion aŭ iun kun granda sindediĉo.

Aŭtorrajto © 2022 de Eldonejo Elevação

Aŭtoro: William Luz

Eldonado, desegnoj kaj revizio:

Skipo Soldatetoj de Dio

Kunordigado kaj desegnoj: William Luz

Ĉiuj rajtoj pri ĉi tiu eldono apartenas
al Eldonejo Elevação.

Rua Doraci, 2-A, sala 103 – Bom Retiro
CEP 01134-050 – São Paulo/SP — Brasil [Brazilo]



E L E V A Ç Ã O

www.elevacao.com.br